# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

9a jarkolekto n-ro 7
septembro 1989


La estraro de FEL invitas ĉiujn membrojn al

## INFORMA KUNSIDO

en la Esperanto-Centro, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, en sabato la 28a de oktobro ekde la 14a horo.

- regularoj pri rondvojaĝoj (ID ?)

Sur la tagordo estos i.a.

- domfilo : reklamigo

≡ Rabatoj en la libroservo de FEL
≡ Aĝolimo de FLEJA-membroj
≡ Karavano al la UK en Kubo
≡ Aspekto kaj enhavo de Esperanto Panorama (+4 p.)
≡ Ekzamenoj en Flandrio
≡ Novaj kotizoj 1990 - donacoj al BEF
≡ subvencidosiero

Krome estas antaŭvidita multe da tempo por starigi demandojn, babili kaj interkonatiĝi, trakribri la libroservon kaj la... bufedon!

- informa materialo
- kongreso Bruselo 91
- ILEI-ekzamenoj (AH)
- telefaksto (PP)
- kurso Petro - Helene

PROTOKOLO DE LA FEL-ESTRARKUNSIDO DE LA 16A DE SEPTEMBRO 1989

Ĉeestas: la estraranoj Monique Caestecker (MC), Ivo Durwael (ID), Jos Vandebergh (JV), Roland Rotsaert (RR) kaj Edward Symoens (ES). Krome ĉeestas Hilde van Ingelgem (HvI) kaj Paul Peeraerts (PP).

0. Antaŭa protokolo: HvI deklaras, ke ŝia forstreko el la listo de komisiitoj estas miskompreno. Si do estas renomita komisiito pri prelegvojaĝoj.

1. FLEJA: TEJO altigis sian aĝlimon ĝis inkl. 29 jaroj. Se FLEJA farus simile, FEL pretas akcepti tion kaj antaŭvidi la perdon en sia buĝeto, tamen kondiĉe ke FLEJA iom pli informu pri sia agado kaj pli aktivu.

2. Libroservo: FEL proponas simpligon de la nuna rabatsistemo. Estos rabato de 10% okaze de aĉeto de 3 ekzempleroj, samaj aŭ ne.

3. Kotizoj: Por unuecigi la kotizojn de FEL kaj APE, APE proponas malaltigi la kotizon de revuo "Esperanto" al 400 frankoj. Akceptita.

4. Financoj: Situacio estas pli bona ol en 1988, sed ĝi tamen restas strikte kontrolenda. Momente estas iom da gajno sed estas malfacile prognozi pri la jarfina situacio.

5. Generala kunveno: FEL okazigos membrokunvenon la 28an de oktobro je la 14a horo. Je la 8.30 estos la estrara kunveno. *Informilo* informu siajn legantojn pri la kunsido. Sur la tagordo estos i.a. la FLEJA-membroj (vidu punkton 1), libroservo (vidu punkton 2) kotizoj (vidu p. 3), ILEI-ekzamenoj (6), aspekto de *Esperanto Panorama* (13), vojaĝoj al Kubo (11).

6. Internaciaj ekzamenoj: FEL proponas ke okazu studotago pri la internaciaj ekzamenoj. ID kontaktis kun Alex Humet pri tio.

7. Libroborso: FEL partoprenos en la alternativa libroborso la 7an kaj 8an de oktobro (11 - 19 h.) en urba festsalono, Meir, Antverpeno.

8. Esperanto-dokumentoj: Ekzistas propono ke FEL eldonu kune kun FEN novan Esperanto-dokumenton, verkitan de Claude Piron. Mariette Erasmus liveros la tekston. PP okupiĝu pri la praktika flanko de la interkonsento. Estas esplorenda ankoraŭ ĉu la aŭtoro donis sian konsenton pri aperigo, kaj kiuj estas liaj honorariaj postuloj.

9. Varbkampanjo: La centro dissendadas leterojn al kulturaj asocioj en kiuj ĝi petas interŝanĝon de reklamspaco kontraŭ grafikaj laboroj.

10. Eŭropa manpremo: La grupo de Oostende preparas karton "Eŭropa manpremo" (Vidu aldonaĵon). Se estas sukcesa kampanjo, aliaj grupoj povos imiti tion.

11. Vojaĝo al Kubo: FEL ne organizos propran karavanon al Kubo, sed esploros ĉu ĝi povus oferti konkretajn kaj malmultekostajn vojaĝeblecojn al siaj membroj. RR okupiĝos pri tio. Jam estas decidite ke la kongreskotizojn de UEA ekde nun peras FEL por tuta Belgio.

12. Propono de Eric Walter: Eric Walter de "Esperanto Association of Britain" proponas organizi ankaŭ grupvojaĝon al Belgio. Car li vizitos Belgion, proponate estas ke tiam ni pli detale ellaboru lian proponon.

13. Kvanto da paĝoj en *Esperanto Panorama*: Kutime estas multe tro da tekstoj por *Esperanto Panorama*. Proponate estas altigi ĝian paĝonombron por ke povu aperi pli da tekstoj. Altigi la paĝonombron per 8 kostus ĉ. 50000 frankojn pli jare. Post longa diskutado venas la jenaj decidoj kaj rekomendoj:
- Car la poŝto foje bezonas 14 tagojn por liveri, la aperdato estonte estu la 15a de la para monato.
- Decidite estas presi 4 pliajn paĝojn, tiel longe ke la financoj tion permesos.
- Rekomendite estas atenti pli la simpatiantojn, neesperantistojn.
- La enpaĝigo estu pli malpeza.
- Oni provizore ne uzu koloran inkon.

14. Antverpeno, ĉefurbo de Eŭropo: En 1993 Antverpeno estos kultura ĉefurbo de Eŭropo. Cu iu organizos festivalon, kongreson? *La verda stelo* interesiĝas pri tio, sed onidire ne jam faris ion konkretan.

15. Regularo pri rondvojaĝoj: Gis nun la divido de kostoj okaze de prelegvojaĝoj estis sufiĉe arbitra. Proponate estas, ke FEL pagu ĉiujn kostojn (vojaĝkostojn, asekuron, honorariojn ktp.) kaj ke ĉiu invitanta grupo pagu fiksan rondan sumon al FEL. ID faros proponon pri regularo.

16. Heredaĵo Van de Wouwer: S-ro Van de Wouwer heredigis siajn brajlajn Esperanto-librojn. HvI informpetos ĉu ekzistas biliotekoj brajlaj kiuj interesiĝas pri la libroj. → [illegible] al CO (Nora Reinders)

17. Venontaj kunsidoj: 21a okt., 9a dec. (20)

18. Financoj: La financa komisiono raportu al la plenkunsido de la Estraro pri la faritaj decidoj.

19. Faks-fondaĵo: Cu FEL daŭrigu sian kampanjon por akiri faksilon? Post longa vigla diskuto la estraro akceptas (kun unu nea voĉo) daŭrigi ĝin. Ĝi krome decidas (2 voĉoj kontraŭ unu) fari ĝin letere. Pri la dato de aĉeto oni decidos en la venonta kunsido.

"When two persons shake hands, each extends his hand halfway, meeting in a neutral zone as a mutual gesture of friendship. So it is with Esperanto: a linguistic handshake."

(*Los Angeles Times*, 10 03 1984, p. 2)

# EUROPESE HANDDRUK – EŬROPA MANPREMO

Naam
*Nomo :* ____________________

Beroep
*Profesio:* ____________________

Voornaam
*Antaŭnomo:* ____________________

Adres
*Adreso :* ____________________

○ Verklaart zich voorstander van de verspreiding, naast andere talen, van de neutrale internationale taal *Esperanto* als middel om een niet-diskriminerende kommunikatie onder de Europese burgers mogelijk te maken.

○ Deze positieve verklaring blijft geldig, zolang de wijziging ervan niet schriftelijk ter kennis werd gebracht aan:

*Flandra Esperanto-Ligo*
*Frankrijklei 140,*
*2000 Antwerpen*

*Datum*
*Dato :* ____________________

*Handtekening*
*Subskribo :* ____________________

Eenmalige (vrijwillige) bijdrage
*Dumviva (libervola) kotizo* (min. 5 fr.): ____________________